


STEFANO

179

El la enhavo:
Konferenco de ĈEA
3-a kongreso de AEH
Interredaktore
Komenio-Zamenhof
Montpellier
Esperanto en Moravio
Junularo



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Antaŭ 80 jaroj forpasis nia Majstro

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 16 gld.

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato.

Membrokategorioj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C
nulgita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G
100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20
ECU, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj,
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntová,
Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova
658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: infana, junulara, skolta,
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-
amikara, de esperantaj-kolektantoj

Komisionoj de ĈEA: gazetara-informa,
ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

Internet: cea@tmet.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100,
Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,
747 05 Opava

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso
02.9912126

Vicprezidanto: Věra Podhradská, Poříčí I, 603
00 Bmo, tel. 05/4323 3047

Sekretario: Květa Hubnová, Esperanto, p.s.
1069, 111 21 Praha 1

Komitato: Blanka Gruntová, Vítězná 95,
784 01 Červenka-Litovel

Komitato: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332
278, fakso 0631/332 507

Komitato: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží
45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

Kontrolgrupo de ĈEA: Jana Holcová,

Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:
Josef Hron, Libuše Krejčí)

Kontisto: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147
00 Praha, tel: 02.460162

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chrdlová,
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel.
02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724
0690

Variabilní symboly pro platby ĈES

- | | |
|--------|-------------------------------------|
| 311 | expedice, úhrada koupených knih |
| 604.2 | pisemné kurzy |
| 604.3 | předplatné Starto |
| 604.5 | předplatné Internacia Fervojisto |
| 668 | dary svazu |
| 668.1 | dividendy |
| 694 | členské příspěvky ĈES |
| 694.1 | členské příspěvky UEA |
| 789.1 | sekce mládeže |
| 789.10 | sekce šachistů |
| 789.11 | sekce sběratelů |
| 789.13 | Sciencia revuo |
| 789.15 | ediční fond, Ringo |
| 789.16 | subkonta klubů mimo uvedených |
| 789.17 | Sekce nevidomých |
| 789.19 | Propagace v reg. tisku |
| 789.3 | sekce železničářů |
| 789.7 | sekce pedagogů |
| 789.71 | ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo) |

Kluby:

- | | | | |
|--------|--------------|--------|----------------|
| 789.30 | Praha | 789.35 | Most |
| 789.31 | Píerov | 789.36 | Náchod |
| 789.32 | Poděbrady | 789.37 | Ostrov n. Ohři |
| 789.33 | Ostrava-Vít. | 789.38 | Úpice |
| 789.34 | Havířov | 789.39 | Žamberk |

Variabilní symbol uvádějte na přední straně
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK
PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol



P.F. 1998

Než odletí poslední listy
spěchající pozdrav od penzisty
bez závisti a nenávisťi
bez vlčí honby za kořistí

Ať stále obzor vítr čistí
Ty listy v roků pohřebišti
generace přišťi
budou o nás čísti

Čestmír Vidman

P.F. 1998

Antaŭ forflugo de lastaj folioj
hastas saluto de pensiulo
Sen odio kaj sen envio
sen lupa al viktimo kuro

Puriĝadu per vento senĉese horizonto
Laŭ tiu foliario en jaroj-tombaro
pri ni legos en onto
venonta homaro

Čestmír Vidman

Eli Urbanová

„VIRKATO“

Mi diras al li „virkato“.
De kiam? De kiu dato?
Simple de certa sabato . . .

Kaj sidis kontraŭ mi sinjoro
en jako kaj kravato . . .
Ni trinkis teon, ne, ne vinon!
Li falus sur la strato!
Kaj mi recitis versojn kaj li
aŭskultis min kun ŝato . . .
Ke ni nin amas, estis klare
sen ia ajn debato . . .
Kaj tamen se mi ne demetus
la robon el brokato,
li eble ĝis hodiaŭ sidus
en jako kaj kravato . . .

Mi diras al li „virkato“.
De kiam? De kiu dato?
Simple de certa sabato . . .



Konferenco de Ĉeĥa Esperanto Asocio

La lastan novembran semajnfinojn 1997 (28.-30.7.1997) kolektiĝis 120 aktivuloj de nia asocio en la domo de kristana junularo en la Franca strato ĉe la placo de Paco en Prago por partopreni la asocian konferencon.

Vendrede vespere rakontis du el niaj partoprenantoj de la Adelajda kongreso,



Jarmila Handlová kaj Petr Chrdle, pri siaj travivaĵoj, kiujn ili ilustris per diapozitivoj kaj humuro. Ni eksciis, ke Aŭstralio timas virusojn kaj armilojn, sekve ne rajtas eniri la landon iu ajn manĝaĵo ekster la stomako nek tranĉilo pli longa ol 100 milimetrojn (ambaŭ kontrolas doganeja rentgeno). Sabate prezentis similan prelegon Quido Janík.

La sabata antaŭtagmezo estis plenigita per fakaj prelegoj pri neprofitaj organizoj, fondaĵoj kaj fondusoj. La asocio mendis du junajn ekspertojn, kiuj detale priskribis la problemaron el vidpunktoj ekonomia (Petr Babouček) kaj jura (Jan Hloušek). Neprofitita organizaĵo rajtas havi profiton,

sed la profiton ĝi devas utiligi por sia bonfara celo, ne ĝin disdoni inter la membraro (kiel ĉe profita organizo inter akciuloj). Ekde 1.1.1998 validas nova leĝo pri neprofitaj organizoj, fondaĵoj kaj fondusoj, al kiu la ĝisnunaj devas adaptiĝi ĝis la fino de 1998. Ekzemple fondaĵo, kies posedo ne estas minimume duonmiliono da kronoj, devas ŝanĝiĝi al fonduso aŭ likvidiĝi. La posedon ne rajtas repreni la fondinto, sed devas ĝin aŭ transigi al alia simila fondaĵo aŭ foruzi por la celo starigita en la fonda statuso.

Posttagmeze lernemuloj partoprenis konversaciajn kursojn en lecionoj ĉe Drahomír Kočvara kaj Miroslav Malovec, dum la ceteraj kunsidis en salono kaj diskutis pri la asociaj problemoj, precipe pri efika propagandado, pri agado de niaj kluboj. Eli Urbanová subskribadis siajn librojn.

Vespere sin prezentis niaj artistoj Eva Seemannová per deklamado kaj Josef Vich per kantado, poste sekvis malgranda dancmuziko.

Dimanĉe kunsidis la pedagogia sekcio, dum la ceteraj promenis tra la urbo kaj vizitis la ekspozicion de Komenio ĝis Zamenhof, pri kiu nia informas aliloke. La kolektiĝintaj pedagogoj konfirmis kiel novan prezidantinon de la sekcio s-inon Jana Melichárková, 696 02 Ratiškovice 938 (ŝia nomo jam aperis en Internacia Pedagogia Revuo 4/97). Membreco al la ĉeĥa ILEI-sekcio kun abono de IPR kostas 100 Kč je la subkonto de ILEI ĉe nia asocio.

(red.)



Financaj donacoj por la asocio de la partoprenintoj de la 5-a konferenco

Baierová Bohumíra	100	Snopek René	1000
Bartovská Marie	100	Šperling Jaroslav	100
Blažek Jan	90	Šváček Miloslav	40
Dvořák Vladimír Ing.	1000	Temelová Alena	100
Dvořáková Pavla PhDr.	1000	Trojanová Libuše	100
Hasala Vladislav	90	Vencl Jiří Ing.	20
Heczko Gustav	100	Vomáčka Jiří	30
Heiser Zdeněk Mgr.	60	Zajíčková Věra	390
Holeček Luděk	30	Zemanová Pavla	60
Hradil Josef MUDr.	100	Zubová Blanka prom. ped.	200
Hrazdírová Anna	100		
Chrdle Petr Dr.	430	celkem	7800
Chrdlová Stanislava Mgr.	430	Dankon al ĉiuj!	
Illek Alois	20	Najado kaj Karel Höger	
Juřica Antonín	150	Unuigita organizo de blinduloj kaj duonblinduloj (Sjednocená organizace nevidomých a slabozrakých ČR - SONS, Karlínské nám. 12, 186 03 Praha 8) eldonis sur du kazedoj la radioelsendon <i>Najado</i> de A. Dvořák en Esperanto de la jaro 1956 (en originalo <i>Rusalka</i>). La komenton legas Karel Höger kaj Jindra Holmanová, kantas Maria Tauberová, Beno Blachut, Ludmila Hanzalíková, Karel Kalaš, Bořek Rujan, Štefa Petrová, Karel Leiss, Milada Jirásková, Dagmar Linhartová, Gabriela Najmanová. Prezo inklude de enpoŝtigo 300 Kč.	
Kafková Květuše	40		
Klaudová Naděžda	30		
Klementová Alena	100		
Kociánová Anna	200		
Kočvara Vlastimil Ing.	80		
Krátká Marie	50		
Křivánková Radka	60		
Kumpošt Bohuslav	100		
Laube Jiří	60		
Mašita Vladimír	60		
Matějková Jarmila	50		
Melichárková Jana Mgr.	60		
Muzikář Stanislav P.	100		
Patera Jiří	90		
Petera Josef	60		
Picková Milena Mgr.	500		
Pluhař Zdeněk Ing.	300		
Podepřel Rostislav	100		

3-a kongreso de AEH en Skokovy 10. - 16. XI. 1997

La kongreso estis arangita en nekredebla situacio, kiam preskaŭ harmonie ĉiuj ebiaj cirkonstancoj, kiel malsaniĝoj, perdo de la okupo, materiaj kaj familiaj problemoj ktp. kaŭzis, ke estis necese prokrasti la kongreson de printempo al aŭtuno. Tamen diversaj operacioj kaj santerapioj de aliĝintoj terure komplikigis la situacion kaj laŭvorte sursultrigis al unuopulo nepriskribeblan amason da laboro pri la preparoj kaj pri la kongreso mem.



Aliĝis 61 personoj el ĈR kaj 7 eksterlandanoj, sed efektive en la pensiono Espero gastis nur 55 ĉeĥaj kaj 1 paro de germanaj esperantistoj.

En la nomo de grave malsana prezidanto de AEH Josef Vaněček malfermis la kongreson lia edzino Jarmila Rýznarová, bonveniginte ĉiujn kongresanojn kaj gastojn - urbestron de Mnichovo Hradiště kaj prezidanton de Asocio de Invalidoj el urbo Semily, kiuj persone salutis la kongresanojn kaj deziris sukceson en nia traktado. Kun plezuro ili konstatis, ke la kongreso okazas en Bohema Paradizo, kie regas agrabla medio en ĉiuj jarsezonoj.

Post laŭtlegado de skribaj salut-mesaĝoj de unuopaj E-organizoj per unuminuta siiento la kongresanoj rememoris forpasintajn membrojn. Poemo „Desperanto“ de doktoro St. Schulhof fermis solenan inaŭguron.

Posttagmeze s-ano Mráz gvidis busekskurson al Nová Paka (muzeo de mineraloj kaj de spiritismo) kaj al Jičín. Vespere koncertis Miroslav Smyčka kun pianakompano de prof. V. Novobilský, kiu ankaŭ prelegis pri Forumo 2000 en Prago. Lia edzino Věra Novobilská deklamis poemojn.

Enkadre de la kongreso realiĝis (merkrede kaj jaŭde) ankaŭ internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, kiujn partoprenis kvar personoj (Miroslava Ascherová, Jitka Drahotová, Josef Hron kaj Pavel Nechvíle), ekzamenis Miroslav Malovec kaj Jaroslav Mráz.

Jaŭde atendis la ceterajn kongresanojn tuttaga busekskurso al Nový Bor (trarigardo de fabriko Cristalex kun faka akompano) kaj al Liberec (botanika ĝardeno). Vespere prelegis s-ano Mráz pri ĉeĥa prospektoro Čeněk Paclt, naskiĝinta en la proksima Turnov.

14. XI. 1997 okazis la II-a plenkunsido, dum kiu gvidanto de balotkomisiono Drahoš Kočvara informis pri balotrezulto. Venis 61

balotiloj, laŭ kiuj plej multe da voĉoj akiris Josef Vaněček, Jarmila Rýznarová, Ing. Josef Hron kaj Zdenka Novotná. Ĉar s-ro Vaněček ne povas plu labori, la kongresanoj elektis lin honora prezidanto pro liaj multjaraj meritoj. Nova estraro de AEH:

Josef Vaněček	- honora prezidanto
Jarmila Rýznarová	- prezidantino, redaktado, korespondado
Ing. Josef Hron	- vicprezidanto, membrobazo, financoj
Zdenka Novotná	- sekretariino, kronikistino, helpo ĉe redaktado
Josef Filip	- preparo de artikoloj por kopiado
Mirka Ascerová	- zorgo pri interesaj artikoloj, ilia aranĝo
Jindra Drahotová	- organizado de seminarioj en Skokovy
Jaroslav Mráz	- korekto de artikoloj, gvidado de skribaj kursoj
Ing. Zdeněk Polák	- kunlaboro kun UEA
Mirka Kosnarová	- rezervulino
Božena Lorencová,	Karel Červinka - revizia komisiono
Marie Návratová	- rezervulino de revizia komisiono

La kongresanoj akceptis ankaŭ rezolucion, en kiu ili reagas je la letero de UEA-prezidanto Lee Chong-Yeong pri la Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo. AEH-laborplano enhavas konkretan formuladon de taskoj, ekz. proponi Esperanton al asocioj de handikapuloj, la prezidantino partoprenos en Montpellier „strategian forumon de la E-komunumo“.

Posttagmeze venis geedzoj Chrdle kun propono de libroj el sia eldonejo kaj kun prelego pri Adelajdo. Sabatan antaŭtagmezan ekskurson al Jilemnice gvidis s-ano Mráz. La planitaj grotoj estis fermitaj, sed ankaŭ muzeo estis interesa. Posttagmezan programon „gaje eĉ serioze“ kun tombolo sperte gvidis s-inoj Novotná kaj Křížková. Dimanĉe kelkaj forveturantoj vizitis ankaŭ nacian ĉevalojon en Kladruby.

(Laŭ AEH-Infofilo)

ZAMENHOFA JUBILEO

Antaŭ 80 jaroj forpasis nia karmemora Majstro la 14-an de aprilo 1917. Printempe ni iomete forgesis la gravan datrevenon, do ni menciuj ĝin almenaŭ vintre, kiam la 15-an de decembro pasis 138 jaroj de lia naskiĝo.



Zájezd do Montpellier



Svaz zdravotně postižených esperantistů se sídlem v Pardubicích pořádá autokarový zájezd do Montpellieru na 83. UEA kongres, který se kona od 1.VIII. do 8.VIII. 1998.

Rámcový program:

Odjezd 30.VII.1998 z Pardubic - 1. noc v autokaru

31.VII. ubytování ve Formuli 1 u Ženevy ve Švýcarsku

1.VIII. příjezd do Montpellieru - ubytování na kolejích Univerzity cca 5 km od Montpellieru. Během týdne dopoledne kongresová jednání pro přihlášené, odpoledne výlety do okolí včetně koupání v moři, večery dle dohody - kongresové programy nebo individuální volno.

V sobotu 8.VIII. v poledne odjezd podél pobřeží Francouzské riviery s návštěvou Monaca a Monte Carla. Ubytování v Itálii poblíž jezera Lago di Garda pravděpodobně v chatkách (zajišťuje pardubická cestovní kancelář).

V neděli 9.VIII. průjezd Itálií a Rakouskem, noc v autokaru, příjezd do Pardubic v pondělí během dne, t.j. 10. srpna 1998.

Zájezd bude uskutečněn jen sejde-li se 40 účastníků. Ubytování je rozjednané, v lednu musíme odeslat zálohu na ubytování. Stravu (kromě snídaně, která je zajištěna na kolejích) si zajišťuje každý sám.

Doprava autokarem Karosa s klimatizací, včetně základního pojištění a ubytování je kalkulována při dnešních cenách kolem 8.-9.000,- Kč. Přihlašovat se mohou i neesperantisté nebo rodinní příslušníci, mohou si koupit kongresovou vstupenku jen na 1 den. Budeme brát i náhradníky, kteří by dostali avizo v posledních 3 týdnech, že se uvolnilo místo.

Esperantisté s legitimací ZTPP a s doprovodem mohou zaplatit kongres až těsně před zahájením kongresu - viz dopis z UEA v kongresové knize AEH.

Zájemci, hlase se na níže uvedené adrese, pokud možno co nejdříve.

AEH

Jarmila Rýznarová

Na okrouhlíku 953/21

530 03 Pardubice

tel. 040 / 66 11 941

EKSPOZICIO Komenio- Zamenhof en Prago

*Ekde 19.11.1997 ĝis januaro 1998
prezentiĝas en la prelega salono de
Lobkovic-palaco en la Praga Kastelo
ekspozicio „De Komenio ĝis Zamenhof”,
mardo-dimanĉo, 9-17 h. Enirpago 20 Kč.*

La ekspozicion inaŭguris la 18-an de novembro 1997 Prof. Vlastimil Novobilský, kiu en sia parolado emfazis, ke kvankam multaj ideoj de Komenio jam realiĝis, la ideo de Paglottia, lingvo universala, ankoraŭ atendas plenan plenumiĝon malgraŭ la fakto, ke la internacia lingvo danke al varsovia kuracisto Zamenhof jam ekzistas kaj eĉ funkcias en la praktiko, tamen nur en limigita amplekso.

La partoprenantoj de la asocia konferenco vizitis la ekspozicion, kiun vi trovos en la strato Jiřská ĉe la Praga kastelo sub la Ora strateto. Granda ĉambro prezentas panelojn kun vivperiodoj de Komenio kaj



J. A. Komenský
(1592 - 1670)



L. L. Zamenhof (1859 - 1917)

Zamenhof kaj vitrin-tablojn kun ekspozitaj libroj (inter ili ekz. la unua lernolibro de Lorenz). Estas nur domaĝe, ke mankas almenaŭ unu vitrino kun novaj lastatempaj libroj, por ke hazarda vizitanto ne opiniu, ke Esperanto finiĝis komence de nia jarcento kun morto de sia aŭtoro. Mankas eĉ libro pri Komenio de F. Kožík *Lumo en tenebroj* eldonita en 1992. Ankaŭ estas dube, ĉu krom esperantistoj iu komprenos, kion komunan havas Komenio kaj Zamenhof, sen legi la broŝuron de F. Hýbl „De Komenio ĝis Zamenhof”, kiun oni tie vendas po 10 Kč. La reciproka rilato de ambaŭ viroj ne estas sur la paneloj klare videbla.

La ekspozicion preparis Muzeo de Komenio en Přerov kunlabore kun lokaj esperantistoj, origine por Varsovio (tial ankaŭ polaj surskriboj). La ekspozicio jam vizitits plurajn urbojn antaŭ Prago.

17. katolický esperantský tábor 1998

se uskuteční od 18. července do 1. srpna 1998 pro všechny esperantisty, členy i nečleny katolické sekce ČES, jejich rodinné příslušníky a známé, všechny bývalé táborníky všech věkových kategorií, zvláště však mladé a jejich kamarády a kamarádky, kteří mají zájem se učit esperanto, nebo kteří své jazykové znalosti chtějí prohloubit a zároveň vytvořit krásné křesťanské společenství k prožití příjemné dovolené nebo prázdnin.

Ubytování je ve dvoulůžkových stanech s podsadami a podlahou. Stravování účastníků je zajišťováno v táboře; obědy jsou dováženy z kuchyně ZD v Sebranicích.

Naplánujte si volný čas na uvedený termín tábora. Sdělte informaci dalším případným zájemcům o účast na tomto táboře, který kromě kurzů esperanta nabízí duchovní programy, rekreaci, koupání, táboráky apod. Pozvěte k účasti své zahraniční přátele hovořící esperantem. Cena bude opět nízká v porovnání k cenám podobných akcí. Přihlášku a další informace obdržíte na adrese IKUE-Katolická sekce ČES, M. Šváček, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice.

Těšíme se nejen na Vaši účast, ale také na aktivní spolupráci, abychom v hezkém přátelském a křesťanském ovzduší opět prožili příjemné dny prázdnin plné nezapomenutelných zážitků v KET v Sebranicích u Liromyšle.



Printempa seminario 1998 en Skokovy

okazos de mardo la 14an de aprilo ĝis sabato la 18an de aprilo 1998, aranĝita de AEH.

Ni invitas ĉiujn, kiuj aliĝos ĝis fino de januaro skribe al Jindra Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav

kaj sendos koverton kun sia adreso, poŝtmarko kaj 20 Kč, por ke ni povu facile resendi detalan programplanon.

La programo enhavas instruadon de lingvo en grupoj, promenadojn kaj gimnastikon, ev. kuracadon. Dum lasta tago, sabato, okazos ekskurso, kiu finiĝos en la urbo, laŭ viaj proponoj, por ke pli facile atingi trafikon hejmen. Mi proponas la urbon Mladá Boleslav. Skribu, ĉu vi konsentas, precizigu horon de via alveno.

Jindra Drahotová

Du komeniologoj



Hazardo, same kiel intereso kunvenigis Leopoldon Mazáč dum praga konferenco pri Komenio ankaŭ kun virino de tute alia sorto kaj de alia komenologia direktiĝo. Kun du kontribuajoj tie prezentigis Blanka Karlsson, kiu post sia edziniĝo elmigris el Ĉeĥoslovakio Svedujon kaj uzis eksterordinaran okazon sekvi tie la spurojn de Komenský. Ŝin ekinteresis ankaŭ organizado de la sveda lernejsistemo kaj samtempe la aktuala delikata problemo por multa elmigrinta familio - kiel procedi en lingva edukado de infanoj. En kadro de la kvara sekcio - J. A. Komenský kaj la antaŭlerneja eduko - ŝi parolis pri bilingvismo kaj eduko en la familio. Ŝi emfazis naturan neceson paroli kun la infanoj en fremda medio per ambaŭ lingvoj - la gepatra kaj la gastiga. Ĝuste la graveco de tiu ĉi problemo ekinteresis la sinjoron direktoron kaj kondukis lin

al persona konatiĝo kun sinjorino Karlsson. La juneca mezlerneja profesoro el sveda Norrköping kontribuis ankaŭ en la akompanan programon de la konferenco, kiun dum la tuta tempo de ĝia daŭro aranĝis la Pedagogia muzeo de J. A. Komenský havanta tiam sidejon en la Valdštejn-palaco. Ŝi diskutis antaŭ ĉio kun la instruistoj pri tre interesaj temoj „J. A. Komenio kaj Svedujo“ kaj „la nuntempa sveda lernejsistemo“. Ŝi parolis ĉefe. La renkontiĝemo de la juna virino kaj manko de kia ajn lingva bariero estigis pluan neĉiutagan amikecon - la kontaktoj de ambaŭ adorantoj de Komenský ne finiĝis kun fino de la konferenco.

Jam en la promenkoridoraj diskutoj venis vico al la fatala agado de svedaj armeoj sur nia teritorio, speciale en Moravio, dum la tridekjara milito. Menciita estis ankaŭ la sieĝado de la kastelo Perštejn fare de la svedoj, la sinjoro direktoro kun entuziasmo rakontis al sinjoro Karlsson pri la templo en Doubravnice, kiun la Perštejn-oj konstruigis kiel arkitekto imponegan rifuĝejon por la kriptoj de siaj familianoj. Al siaj geamikoj li unu jaron pli poste skribis preskaŭ detektivan historion: *La Perštejnoj havas ĉe ni familian kripton kaj*

konstruigis ĉi tie belegan marmoran preĝejon. Ni serĉas la stanajn kaj arĝentajn ĉerkojn de Perŝtejn, kiujn la svedoj ĉe la sieĝado de la kastelo Perŝtejn 1645 forveturigis. Mi administras pri tio ampleksan korespondadon. Dum la praga konferenco pri Komenio mi konatiĝis



kun sinjorino naskiĝinta en Prago kaj edziniĝinta en Svedio, komeniologino kaj ĉiuflanka scienca laborantino interamikiĝinta kun la sveda reĝa kortego, kiu min certigis, se la ĉerkoj vere troviĝas en Svedujo, ke ŝi ilin elserĉos. Eble ŝi sukcesos.

Forpasis pluaj tri jaroj. La amikeco de la ĉeĥa-sveda komeniologino kaj la lernejestro en Doubravnice daŭras plu ne nur en formo de neformala korespondado. Sinjorino Karlsson informis sian amikon en Moravio dum la tuta tempo de la esplorado pri ĝiaj rezultoj kaj en la jaro 1995, ĝuste tiam, kiam li resaniĝadis post sufiĉe grava malsaniĝo, surprizis lin sciigo, ke en la kriptoj de certa monaĥejo kapelo ŝi malkovris

konsiderinde grandan nombron de ĉerkoj, inter kiuj povus esti ankaŭ tiuj serĉataj. La plua evoluo de la situacio estos versimile komplika. Pli multe ol tio, ĉu estas reala espero je ilia eventuala revenigo estas necese en samtempo pensi pri preskaŭ nekredebla realeco - per sia ekinteresiĝo pri la afero, per sia prihistoria kaj certe ankaŭ patriotisma entuziasmiĝo la 90-jara instruisto-emerito sukcesis akiri la pli junan kaj je mil kilometroj malproksiman esploristaron por kunlaboro, kies la plej ĉefa alportajo por li estas la amikeco. La amikeca strebo fortigas la aktivecon de la maljuna sinjoro kaj nutras liajn interesojn pri aferoj, por kiuj al liaj samaĝuloj, sed ankaŭ al multe pli junaj homoj, mankas fortoj kaj versimile eĉ ne sentas sin alparolitaj de ili.

(el *Kiel la koro de sonorilo de Vlasta Urbánková*, tr. Jana Cíhová)



Orharulino

En certa reĝolando vivis senfamilia reĝo, kiu havis tre ambicieman serviston Georgon. Tamen la servisto malgraŭ sia nediskutebla karteremo ludis ĉe la kortego nur la duan violonon, ĉar la unuan dismordis al li la anoj de la reĝa arĉorkestro, post kiam ili formangiis fritafajon el fungoj nomataj folklore „vulpoj“ kaj tiuj vulpoj obsedis ilin per rabio.

Ne povante ĝui la unuan rolon ĉe la kortego, Georgo frekventis diversajn vesperajn lernejojn, posttagmezajn kursojn kaj aliajn aranĝojn de dubaj kvalito kaj famo, por denove sin katapulti sub la sunplenan firmamenton de la reĝa favoro. Bedaŭrinde li ne ĉiam sukcesis kaj ekzemple el danckurso jam post du semajnoj li estis eksigita pro moveco pli elefanta ol eleganta, ĉar dum tango li trafis per sia piedo en dekolton de sia partnerino. En la aŭtolernejo oni ne tre amis lian buldozon, same kiel en la volejbala teamo.

Dum certa tempo li amuziĝis per ideo, ke li enskribos sin en la muzikan popol-akademion, eltiris sian duan violonon kaj dum liberaj vesperoj post la laborhoroj li klopodis blovi en ĝin, sed ne povante eltiri eĉ modestan sonon

similan al melodio, li denove subapogis per ĝi la ŝrankon.

Tamen Georgo ne apartenis al tiuj, kiuj jetas sian hakilon en laĝon jam post la unuaj 168 malsukcesoj, kaj unu belan tagon li frapis la pordon ĉe la lingvo-lernejo. Komence li denove spertis malfacilaĵojn ankaŭ ĉi tie: oni ne akceptis lin por studi la rusan lingvon, ĉar kiam la komisiono demandis pri Puŝkino, li opiniis laŭ la nomo, ke temas pri inventinto de la soveta puŝebla veturanta kinejo, kaj kiam ĉe buŝekzameno aŭdis Avo Frosto lian granitan prononcon de malmola signo, li rompis sur lia kapo sian bastonon Frostigilon. En la kurson de la angla Georgo penetris, sed apenaŭ li ellernis kelkajn vortojn,



en kinejo li prikiis gemantojn per „Silence!“ kaj estis ekskortita kiel frenezulo rekte en la ĉelon por mensmalsanuloj.

Liberlasita per reĝa interveno, li denove direktis siajn paŝojn firme en la „malican“ lingvo-lernejon, sed por provi alian ŝancon li elektis bestolingvon. Kaj la ĉarma mondo miru! - ĉifoje nenio malagrabla okazis. Li eĉ sukcesis ĉe fina ŝtata ekzameno, kie ekzamenis vera denaska parolanto, nome neniu alia ol siberia tigro. Sukcesis nur malmultaj, ĉar la menciita siberia tigro jam ses semajnojn ne vidis viandon kaj dum ekzameno formangiĝis preskaŭ ĉiujn kursanojn eĉ kun la korpulenta sinjoro Pasteĉo. Krom Georgo, kies figuro estis evidente rakitisma, saviĝis nur sinjorino Aktivulino, kiu juris je ĉiuj sanktuloj, ke la 40 jaroj de socialisma konstruado ŝin komplete travenenigis kaj faris ŝian karnon tute ne digestebla, kaj fraŭlino Ŝminkema, kiu matene - vojaĝante per plenŝtopita kaj skuata urba buso - ensnufis sian rufon per la nazo - sekve en la momento de la tigra luncado ŝi restadis en la sekureco de la urba polikliniko, fako orelnaza-gorĝa.

Freŝe diplomita Georgo staris foje kun la reĝo ĉe malfermita fenestro kaj aŭskultis babiladon de kokinoj de malsupre. Iu kokino diris: „... sed kiel amorulino neniu egalas al princino Orharulino.“ La reĝo tuj rimarkis lian frande volupteman rideton kaj Georgo devis konfesi la

veron. Ĉiloke necesas klarigi, ke la reĝo dum multaj jaroj vane serĉis fianĉinon, kaj lia malespero jam atingis tian grandecon, ke li kontentiĝus almenaŭ per iu rano, kiun li povus ŝanĝi per kiso al reĝidino. Tiutempe la orientaj fratoj fermis kranon ĉe la sola ranodukto, kiu kondukis en la landon, la reĝo povis kisadi nur salamandrojn, sed tia agado ne rezultigis la sopiratan efekton. Tial vi, karaj infanoj, certe ne miras, ke tuj la sekvan tagon la servisto ricevis de la reĝo novan bagro-buldozon kaj ordonon elserĉi kaj venigi reĝidino Orharulinon.

Georgo, tute ne sciinte, en kiun direkton turni sian maŝinon unue, klakfermis aŭto-atlason kaj ekveturis rekte tien, kien montris lia nazo - trans infanaj ludejoj kaj ĝardenaj kolonioj, tra padoj, ŝoseoj kaj aŭtostradoj kaj post unu semajno li atingis profundan arbaron, kie li malaperis.

Ni ne povas dubi, ke li ĝis nun serĉas la Orharulinon kaj kiam li disponigos al amaskomunikiloj ian informon pri la stato de sia aktivado, ankaŭ ni daŭrigos nian fabelan raportadon.

(libere laŭ nia leganto Votoček)



JUNULARO



Saluton!

Venas plua jaro de nia vivo kaj ni ĉiuj proklamas pli kaj malpli grandajn promesojn kaj sekrete ni esperas je sano, feliĉo, sukceso kaj harmonia estado.

Fine de la jaro kelkaj fervoraj anoj de Ĉeĥa Esperanto-Junularo demandis sin: Je kio ni enfokusiĝu venontjare? La respondo estis klara ne nur ĉifoje, sed jam antaŭ kelkaj jaroj. Ni strebu, ke ne nur kelkaj, sed ankaŭ pliaj, por ni ankoraŭ ne konataj, homoj ĝoju uzante la lingvon Esperanto por kunvenadi, entrepreni kaj celi sencohavajn ideojn.

La ĉefa agado estos pligrandigi jam konatajn somerajn kursojn je ĉeĥaj partoprenantoj kaj motivi ilin por plua engaĝiĝo.



Mi skizu kelkajn faktojn pri membreco, por ke ankaŭ vi havu eblecon

uzi financajn subtenojn de la sekcio.

Membriĝi en ĈEJ rajtas ĉiu membro de ĈEA, kiu aĝas minimume 15 kaj maksimume 30 jarojn.

Vi povas esti individua membro kaj uzi ĉiujn rabatojn ofertitajn pere de ĈEJ. Unujara kotizo por laboruloj estas 100 kronoj kaj por studentoj kaj senlaboruloj 65 kronoj. Individuaj membroj ricevas regule la bultenon Cirkulero, rabaton por Pasporta Servo, por la ĉijaraj someraj E-kursoj de ĈEJ kaj 15-procentan rabaton por TEJO-membreco. Eblas ricevi financan subtenon por eksterlandaj aranĝoj regule menciitaj en Cirkulero.

Kaze ke via aĝo ne respondecas kun tiu de membreco kaj/aŭ vi ŝatus havi informojn pri la agado, vi povas esti neindividua membro ricevante Cirkuleron. Unujara abono por homoj loĝantaj en Ĉeĥio estas 110 kronoj kaj por tiuj loĝantaj eksterlande 210 kronoj. La diferenco rezultiĝas de posttarifoj.

Ĉiuj el ni ŝatas foje vojaĝi, amikiĝi kun aliaj, tiom pli kun homoj kredantaj je similaj aferoj, spertiĝi en diversaj fakoj aŭ simple kafumi kaj klaĉi. Ni invitas vin resti kune

por kelkaj tagoj kaj fari iun el jam menciitaj agoj.

Tuj komence de la jaro ni povas kune skii en „Ledňáček“, jam tradicia renkontiĝo en Horní Polubný ĉe Tanvald (29.1.-1.2.1998). Por pluaj informoj kontaktu Jan Navrátil, Jaseňská 319/8, 415 03 Teplice, tel. 417/27625. La aranĝo kutime abundas je junaj homoj kaj tiel ni uzas la eblecon kaj dum vendreda aŭ sabata vespero ni konferencas. Ne



timu la noblan vorton! Ni kune sidiĝu kaj diskutu pri nia sekcio, ĝiaj servoj kaj eblaj plibonigoj, freŝaj ideoj. Membroj de ĈEJ partoprenontaj la konferencon ricevos financon subtenon de 100 kronoj.

Ĉu vi scias, ke ĉiu homo devas ricevi kison je la 1-a de majo por ke...? Ni ne nur kisos unu la alian, sed ankaŭ migros, sportos, klaĉos pri ni kaj la vivo - en vilaĝeto Třebihošť ĉe Dvůr Králové, la loko kiun jam

atingis eĉ eksterlandaj esperantistoj. La aranĝo komenciĝas kompreneble la 1-an de majo, daŭros tri tagojn, kaj invitas vin sentelefona Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v P.

Ni jam komencis diskuti pri la jubilea 10-a Vina seminario, kiu okazos fine de septembro en suda Moravio. Ŝatantoj ne nur de trinkado, sed/kaj precipe de la scienco privina, vi certe ne bedaŭros veni al internacia rondo de junuloj, mez-aĝuloj kaj eĉ pli aĝuloj! Se vi skribos al Jana Burianová, Reneská 35, 639 00 Brno, tel. 05/43243774, ŝi baldaŭ respondos viajn demandojn pri la aranĝo.

Fine de la mesaĝo ankaŭ sciu pri niaj „gravuloj“. La prezidantino estas Blanka Gruntová, kiu superrigardas la agadon de ĈEJ, redaktas Cirkuleron kaj tenas rilaton kun aliaj E-organizoj. La sekcion vicprezidas

Renata Beranová zorgante pri membrobazo, administrado kaj ĉiuj stultaj necesajoj. Jana Burianová certigas nin kontraŭ bankroto, troa elspezado kaj malsaĝa uzo de monrimedoj.

Blanka Gruntová, Vítězná 95, 784 01 Červenka Renata Beranová, Svatoplukova 43, 784 01 Červenka Jana Burianová, Reneská 35, 639 00 Brno

Sekce mládeže ČES Vás zve již po sedmé na

MEZINÁRODNÍ KURSY ESPERANTA PRO MLÁDEŽ

Praha, 18.-25.7. 1998

Kursy jsou určeny začátečníkům, věčným začátečníkům i „protřelým“ esperantistům. Na jejich přípravě se také budou podílet mladí esperantisté z Itálie, Německa a zemi Beneluxu.

Nabízíme Vám čtyři úrovně kursů:

- A - kurs pro začátečníky (výuka na základě mateřského jazyka)
- B - kurs pro mírně pokročilé (účastníci z více zemí, výuka v esperantu)
předpoklad: aktivní znalost nejméně 500 slovních kmenů
- C - kurs pro pokročilé (výuka v esperantu, zahraniční lektor)
příprava na mezinárodní zkoušky UEA/ILEI - meza nivelo
- D - jazykově-didaktický seminář pro případné budoucí učitele esperanta, kteří nejsou profesionální učitelé - jazykáři

Program:

Dopoledne - výuka (čtyři vyučovací hodiny)

Odpoledne a večer - výběrové semináře, společenské programy.

Jeden celodenní výlet.

Fakultativní program: dle vašeho zájmu zajistíme vstupenky na vybrané kulturní pořady.

-----><-----

Příjmení _____ Jméno _____

Adresa _____

Telefon _____ OP _____

Datum narození _____

Povolání/obor studia _____

Kursy proběhnou v Domově mládeže v Praze - Malešicích v klidném prostředí nedaleko centra města (stanice metra Želivského). Ubytování je zajištěno v třílůžkových pokojích (sprcha a WC společné pro dva pokoje). Cena pro české účastníky:

Přihlášky a poplatky	do 15.4.	do 15.6.
Členové SM - kat. A	1290,- Kč	1390,- Kč
Ostatní	1950,- Kč	2050,- Kč
Kurs bez ubytování a stravy	450,- Kč	550,- Kč

Cena zahrnuje ubytování, stravu třikrát denně a pro všechny výuku a studijní materiály, prohlídku Prahy, zajištění konání mezinárodních zkoušek. Absolventům začátečnických kursů věnujeme členství v ČEJ na druhou polovinu r. 1998.

POZOR! V současnosti jednáme o možnostech vykonat mezinárodní zkoušky UEA/ILEI na závěr kursů. Každá zkouška obsahuje

- připouštěcí test
- písemnou část
- konverzační část

V případě, že bude umožněno vykonání těchto zkoušek, okamžitě Vás informujeme spolu s dalším detailním plánem a požadavky. Prosíme Vás, abyste ke své přihlášce předběžně a nezávazně připojili, zda máte o tyto zkoušky zájem.

Přihlášku zašlete na adresu: Renata Beranová, Svatoplukova 43, 784 01 Červenka

Kurs ----- Vegetarián ano / ne

Do programu mohu přispět _____

Mám zájem o UEA/ILEI zkoušky _____

Přečetl/a jsem si pozorně pozvánku na Mezinárodní kursy esperanta pro mládež a souhlasím s uvedenými podmínkami.

Datum _____ Podpis _____

Rememoro je Esperanto-agado en meza Moravio

Pasintnumere mi erare skribis, ke la renkontiĝo de moraviaj kaj sileziaj esperantistoj en Pĕřerov la 25-an de oktobro 1997 okazis omaĝe al 85-jariĝo de la klubo, kiun rememorigis d-ro Mohapl. Ricevinte la prelegon kun atentigo, ke tiutempe la klubo ankoraŭ ne ekzistis, mi petas pardonon kaj prezentas la tekston, kiu reĝustigas mian eraron.

(red.)

Ni rememoras renkontiĝon de moraviaj esperantistoj, kiu estis aranĝita en la urbo Pĕřerov antaŭ 85 jaroj. Precize tio okazis la 27-an de majo 1912.

Se ni rememoras la historion, estus bone diri ion pri la stato de la Esperanto-movado en Moravio en la tempo de la menciita Esperanto-renkontiĝo. Ekzistis tiam jam naŭ Esperanto-klubo en Moravio. Krom Brno, kies klubo estis fondita en jaro 1901 kaj estis la plej malnova en tuta tiama aŭstra-hungara monarĥio, funkciis kluboj en Prostĕjov, (fondita 7. 2. 1909), en Moravská Ostrava, Olomouc, Vítkovice, Vsetín, sed ankaŭ en lokoj, en kiuj nuntempe pri organizita Esperanto-movado oni nenion aŭdas. Tiuj ĉi lokoj estas Bystřice p. Host., Luhačovice kaj

Ivanovice n. H. Interesa estas, ke en Pĕřerov Esperanto-klubo ankoraŭ ne ekzistis, estis tie nur unuopaj esperantistoj. El tio rezultiĝas, ke en la preparo de la renkontiĝo, kiun ni rememoras, devis helpi aktivuloj el aliaj moraviaj Esperanto-klubo.

Parolante pri la historio de nia movado, estas necese menci pri la grupo havanta nomon „Moraviaj Esperanto-Pioniroj“. Ĝi ekestis en Olomouc, ĝiaj fondintoj estis junaj

fervoruloj s-anoj Jaroslav Mastný kaj Josef Friedrich, kiuj laŭ siaj propraj vortoj, volis prepari vojon al pli bonaj tagoj de la Esperanto-movado per

intensiva propagandado. Ili sukcesis eldoni ilustritan publikaĵon „Gvidlibro tra Olomouc“, plue „Gvidfolion sur poŝtkarto“ kaj glumarkojn kun citaĵoj el verko de J. A. Komenský (Comenius). Tre grava estas ilia broŝuro kun nomo „Esperantista movado en Moravio“, eldonita komence de jaro 1914. En ĝi ni trovas tre valorajn fontojn de la konoj pri la stato de tiama moravia Esperanto-movado.

Dum la unua mondmilito Moraviaj

Esperanto-Pioniroj ne havis eblecon disvolvi plu sian agadon. Sed baldaŭ post ĝia finiĝo en la ekestinta memstara respubliko ili renovigis sian aktivecon. La grupo perdis unu el siaj kunfondintoj, s-anon Josef Friedrich kaŭze de lia foriro el Olomouc, sed ĝi gajnis pluajn oferemajn kunlaborantojn, el kiuj la plej grava estis s-ano Josef Rebiček, oficisto de la fervojdirekcio en Olomouc. La renovigita grupo ekkomencis eldonadi tradukojn el ĉeĥa literaturo kaj tiamaniere ĝi volis konatigi fremdajn landojn pri nia nacia kulturo. La unua traduko de MEP aperis en la jaro 1921, ĝi estis libreto de verkisto Jiří Mahen „La koboldo Ondra“ (Skřítek Ondra). En jaro 1926 MEP sukcesis eldoni tradukon de utopia dramo „RUR“ de Karel Čapek kaj ĝis fino de nia unua respubliko ankoraŭ pluajn 12 librojn, preskaŭ ĉiujare almenaŭ unu. Inter ili estas ekzemple „Fokso-Nukso“ de Ignát Herrmann, *Noveloj* de K. M. Čapek-Chod, *Noveloj* de Jiří Sumín kaj de Růžena Svobodová, „Malriĉa knabo, kiu gloriĝis“ de Jan Herben,



sed ankaŭ „Tridek jarojn en la Ora Nordo“ de Jan Welzl kaj *Filozofia vortaro* de D-ro Kamaryt. Lasta eldonaĵo de MEP estis en jaro 1938 „La blanka malsano“ de Karel Čapek. Ĝi aperis en la tempo de kreskanta minacado por nia respubliko per naziista Germanio kaj havis grandan eĥon en demokratia mondo. Brilan tradukon de ĉi tiu libro faris por MEP s-ano prof. Kilian el Třebíč. En plejmulto de antaŭaj eldonaĵoj estis kiel tradukinto aludita nur MEP. Sed kiu persono vere ĉi tiujn tradukojn faris? Laŭ tio, kion mi sukcesis konstati, tiu ĉi persono estis s-ano Josef Rebiček, homo ekzemple modesta, kiu neniam volis, ke oni parolu pri liaj meritoj kaj ke oni aludu lian nomon rilate la laboron, kiun li faris.

La grupo de MEP ne dediĉis sin nur je tradukado kaj eldonado de libroj. Fine de la dudekaj kaj komence de la tridekaj jaroj gazeto de tiama Asocio de ĉeĥoslovakaj esperantistoj *La Progreso* pro financaj kaŭzoj aperadis tre neregule, en longaj intervaloj kaj fine tute malaperis. Nia esperantistaro tiel restis sen tutŝtata presorgano. Tial la grupo de MEP en kunlaboro kun esperantistoj el Olomouc, Prostějov kaj Přerov ekkomencis eldonadi novan gazeton kun nomo „Ligilo“. Ĝia redaktoro fariĝis aktivulo de E-klubo en Prostějov s-ano František

Heikenwalder kaj helpo de esperantistoj en Pˇerov presado de la nova gazeto prizorgadis presejo en urbo Pˇerov. Tiel esperantistoj el meza Moravio forigis la mankon de tutŝtata Esperanto-presorgano kaj ilia agado tiurilate daŭris ĝis la jaro 1938, kiam eldonado de Ligilo transprenis la Asocio de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio.

Alveno de naziistaj okupaciintoj en jaro 1939 ĉesigis agadon de Esperanto-klubo kaj ankaŭ de la grupo de MEP. Vico da esperantistoj enviciĝis en la kontraŭnaziistan rezistmovadon kaj kelkaj el ili estis pro tio arestitaj. Inter ili estis ankaŭ oferema kunlaborantino de MEP s-anino Antonie Mrazkova, kiu en la jaro 1942 mortis en naziista koncentrejo Auschwitz (Oŝwiecim).

Post la liberigo de la patrujo ne nur la mezmoraviaj E-klubo renovigis sian agadon, sed ankaŭ la grupo de MEP reviviĝis. Ili intencis ekkomenci la novan eldonadon per Esperanto-traduko de Ĉarto de Unuigintaj nacioj. S-ano Josef ˇebicek jam preparis la tradukon. En majo 1947 tiama ministro por eksterlandaj aferoj Jan Masaryk dum sia vizito en Olomouc akceptis delegacion de la loka Esperanto-klubo, kiu informis lin pri la menciita preparata agado de MEP kaj samtempe petis lin, ke li skribu enkondukvortojn al la Esperanto-traduko de la Ĉarto. S-ro ministro kun kompreno promesis.

Bedaŭrinde venis la okazintaĵoj de jaro 1948 kaj la eldonplanoj de MEP jam ne povis efektiviĝi.



Sed eĉ en la malfavoraj tempoj, kiuj por esperantistoj ekestis post likvido de la Asocio de esperantistoj en ĈSR, en meza Moravio esperantistoj ne rezignis, ili plejparte trovis fundamenton por sia plua agado en lokaj klerigaj institucioj kaj en sindikataj kulturkluboj. En regiono de Olomouc pri organizado de la Esperanto-movado tre meritiĝis regiona peranto de la likvidita Asocio s-ano Vlastimil Blažek. Estis aranĝataj regionaj laborkonferencoj eĉ post likvido de la Asocio kaj ĝiaj membroj en ĉi tiu regiono estis informataj pri okazintaĵoj en Esperanto-mondo per cirkulero „Informilo Hana - Jesenky“. Speciale grava estis pli posta kunlaboro kun esperantistoj de Ostrava-regiono, kie tiama regiona peranto disvolvadis sian agadon ankaŭ eĉ post malapero de la E-asocio. El la komunaj laborkonferencoj grava estis tiu, kiu okazis en majo 1954 en Pˇerov. Dum plua konferenco aranĝita 9. 1. 1955 en Olomouc kun partopreno de

122 esperantistoj el 28 lokoj estis akceptita propono, krei tutŝtatan konsultan kolezion, kiu zorgus pri kunordigo de la Esperanto-agado en tuta respubliko. Kiel prezidanto de ĉi tiu kolegio estis elektita s-ano Rudolf Burda el Plzeň, eldonanto de tiama tutŝtata cirkulero La Pac-defendanto kaj kiel sekretario aktivilo de E-klubo en Olomouc s-ano Miloš Rudolf. Kreo de la konsulta kolegio estis konfirmita per tutŝtata konferenco de la esperantistoj pac-defendantoj okazinta en julio 1955 en moravia urbo Otrokovice. La kolegio, kies prezidanto pli poste fariĝis s-ano Josef Vitek, ekkomencis traktadon kun ministerio por lernejaferoj kaj kulturo por atingi legitimon al kunordigo de la agado de Esperanto-rondetoj en la tuta respubliko. Surbaze de tiuj ĉi traktadoj la konsulta kolegio kunvokis tutŝtatan konferencon de esperantistoj je la tagoj 20-a kaj 21-a de oktobro 1956 en urbon Olomouc kun celo krei novan tutŝtatan organizon de esperantistoj. Sed en la lasta momento la ministerio nuligis antaŭan konsenton kaj la konferenco ne povis okazi. La plua traktado havis almenaŭ tiun rezulton, ke ĉe Kleriga instituto en Prago estis formita Ĉs. Esperanto-komitato kiel konsulta organo de la ministerio kaj ĝi kunordigis la agadon de Esperanto-rondetoj ĝis la jaro 1969, kiam estis kreitaj novaj Esperanto-asocioj, ĉeĥa

kaj slovaka. Mi rememoras ĉi tiujn okazintaĵojn por akcenti la fakton, ke fundamento por la nuna ĈEA estis kreita ĉi tie en Moravio.

Post kreo de la E-komitato kaj post ekesto de la nova Ĉeĥa Esperanto-asocio la kunlaboro de Esperanto-grupoj en meza Moravio daŭrigis, sed ĝi ne estis tiel intensa, kiel pli frue. Tieaj E-grupoj helpadis al si reciproke ĉe ĉiuj pli gravaj aranĝoj. Oni povas rememorigi precipe la 5-an ĉeĥan E-kongreson en Olomouc en jaro 1987, kongreson de IFEF, kongreson de IKUE kaj diversajn vizitojn de eksterlandaj esperantistoj. Gravan plivigligon de ĉi tiu kunlaboro kaŭzis iniciato de E-klubo en Prostějov aranĝadi de tempo al tempo renkontiĝojn de reprezentantoj el mezmoraviaj E-kluboj kaj tie regule sin informadi pri la agado kaj pri atingitaj rezultoj. Nuntempe en ĉi tiun kunlaboron enviciĝis kvar E-kluboj: el Prostějov, Přerov, Olomouc kaj Vyškov. Tio rajtigas esperon, ke la mezmoraviaj Esperanto-grupoj bone trapasos ankaŭ la nunan por Esperanto ne multe favoran situacion en nia ŝtato. Estas necese ĉiam memorigi, kiajn rezultojn alportis la kunlaboro de esperantistoj en ĉi tiu regiono en pasinteco, ĉi tiun tradicion daŭrigi kaj tiel gvidi nian movadon al pli sukcesa estonteco.

D-ro Vlad. Mohapl

ĈIJARAJ JUBILEOJ

RNDr. Josef Kavka (1922)	- 75 jaroj
Dr. Jaromír Jermář (1922)	- 75 jaroj
Josef Rumler (1922)	- 75 jaroj
Josef Vích (1932)	- 65 jaroj
Vladimír Vaňa (1932)	- 65 jaroj
Jan Šebela (1932-1997)	- 65 jaroj
Lubomír Sředa (1932)	- 65 jaroj
Josef Mendl (1932)	- 65 jaroj
Zdeněk Rusín (1937)	- 60 jaroj

Ni rememoru:

Adolf Bartošik	(1907-)
Josef Bednář	(1887-1966)
Leopold Berger	(1887-1954)
Karel Hynek Bouška	(1884-1962)
Rudolf Burda	(1902-1968)
Theodor Ĉejka	(1878-1957)
Karel Höger	(1909-1977)
Francisko V. Lorenz	(1872-1957)
Miloš Lukáš	(1897-1976)
Jaroslav Mastný	(1892-1958)
Antonie Mrázková	(1891-1942)
Stanislav K. Neumann	(1875-1947)
Jaroslav Novobilský	(1903-1942)
Karel Procházka	(1880-1957)
Tomáš Pumpř	(1906-1972)
Antonín Seemann	(1907-1973)
Otto Sklenčka	(1891-1962)
Božena Sklenčková	(1897-1983)
Antonín Slavík	(1893-1942)
Ing. Miroslav Tůma	(1920-1992)
Božena Vlčková	(1887-1978)

50 JAROJ DE Esperanto-klubo EN TŘEBÍČ

„La 16-an de decembro 1947, en la jubilea jaro de Esperanto, fondiĝis en Třebíč loka grupo de Esperanto-Asocio en ĈSR. La fonda kunveno partoprenis 32 gesamideanoj de nia urbo. Post nelonga parolado, fare de la loka delegito de UEA, pri la 60-jara ekzistado de Esperanto, pri la demokratia strukturo de la Esperanto-movado kaj pri ĝia kreinto Dro L. L. Zamenhof, kies 88-an datrevenon de la naskiĝtago la tutmonda esperantistaro festis la antaŭan tagon, la kunveno elektis provizoran komitaton prezentotan al la unua ĝenerala kunveno de la ĵus fondita loka grupo. Inter la fondintoj troviĝas eminentuloj de la publika vivo de la urbo, nome la urbestro, la estro de la Distrikta politika administracio, docento ĉe universitato kaj ĉefkuracisto de la loka malsanulejo, distrikta inspektoro de publikaj bibliotekoj, fabrikanto, direktoro de burĝa lernejo k.a. Ni do povas prave esperi, ke la loka grupo en Třebíč honeste plenumos sian taskon en komuna laboro por la fina venko de Esperanto. [Th. Kilian]“

Tiel en *Esperantista 1/1948* prezentis novan klubon Th. Kilian, kiu fariĝis ĝia motoro ĝis sia morto en 1978. Lia domo en la strato *Esperantistů* ĝis nun servas kiel klubejo kun biblioteko de li kolektita.



INTERREDAKTORE

el retroŝto de Internet ni ricevis multajn informojn pri nia movado; la plej gravajn ni prezentas en konciza formo al la legantoj:



■ La 30-an de oktobro 1997 estis fondita Irana Esperanto-Centro en Teherano kun biblioteko, libroservo, kursoj kaj prepar-komitato por fondo de irana E-asocio

■ La federacia prezidento de Germanio, prof. Roman Herzog, estos la Alta Protektanto de la UK en Berlino (1999).

■ Fuji Xerox, granda informfirmao en Japanio, aperigis tutpaĝan reklamon japanlingvan (40 cm x 55 cm) pri Zamenhof kaj Esperanto en la Japana Ekonomia Ĵurnalo (Nippon Keizai Shinbun), la plej granda ekonomia tagĵurnalo en Japanio.

■ Hungara E-Junularo dissendis al 800 mezlernejoj en la lando koloran afiŝon pri Esperanto, kio rezultigis amason de telefonvokoj kaj leteroj.

■ Entreprenoj uzantaj Esperanton ricevas 50 %-an rabaton, se ili aliĝas al la varokatalogo „CompInfo“ en Internet.

■ Akademiano Carlo Stop-Bowitz estis enterigita la 7-an de novembro 1997. Li esperantigis zoologian nomenklaturon.

■ La 14-an de novembro 1997 pluraj asocioj por defendo de la franca lingvo manifestaciis antaŭ la Franca Akamedio en Parizo kontraŭ la eldiro de la ministro pri edukado, ke francoj ĉesu konsideri la anglan fremda lingvo.

■ La ensemblo Sonic Youth aperigos sian 3-an albumon al Julfestoj (ĉe katolikoj: Kristnasko) - en Esperanto!

■ Fondaĵo Esperanto ĉe la Budapeŝta

E-Domo ricevis 580 mil, HEA 280 mil kaj HEJ 19 mil forintojn de neesperantistoj dank' al nova leĝo, ke 1 %-on de la persona enspez-imposto oni povas oferti al neprofitcelaj sociaj organizoj kaj fondaĵoj (pere de impost-ofico).

■ Senatano Casildo Maldaner favore menciis Esperanton dum sia parolado antaŭ la pleno de la Brazila Senato, la 3-an de Novembro. La parolado estis publikigita en la Gazeto de Federacia Senato la 4-an de Novembro je la paĝo 23735 .

■ La nova ĉefministro de la pola registaro Jerzy Buzek nomumis vicŝtatestretario en sia Kancelario la estron de la Eksterlanda Programo de Pola Radio, Jerzy Marek Nowakowski, kiu subtenas la E-elsendojn.

■ La Estraro de Hispana Esperanto-Federacio, kunveninta en Madrido la 1-an de novembro, decidis okazigi sian venontjaran (1-3 majo 1998) kongreson en Valadolido (Valladolid).

■ En Gliwice (suda Pollando) okazis 2-taga tutlanda e-ista renkontiĝo de praktikantoj kaj uzantoj de E-o kaj 2-taga raporta-elekta konferenco de Pola E-Asocio (8-9.11.97 kaj 10-11.11.97). Partoprenis entute ĉ. 80 personoj el Pollando, Ĉeĥio, Germanio, Aŭstrio. Inĝ. Stanislaw Mandrak iĝis nova prezidanto de PEA, krome en la nova ĉefa estraro i.a. troviĝas Aleksandro Zdechlik el

Gliwice, Ewa Misior kaj Lech Piotrowski el Varsovio kaj Stanislaw Gonczaruk el Szczecin.

■ TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, enkadre de kunlaboro inter la esperantistaj grupoj de Laborkomunumo ALP-ADRIO, prezentis - de la 20 ĝis la 29 de novembro - akvarelojn de la hungara pentristo-esperantisto János B. Tóth ĉe unu el la plej aktivaj galerioj de Triesto-Italio.

■ Marjorie Boulton ricevis la Esperanto-Kulturpremion de urbo Aalen kaj FAME-fondaĵo.

■ 3-a Kolombia Kongreso de Esperanto okazis 15-17 de novembro 1997 en Medejino

■ La 16an de Novembro estis projekciita, kadre de la prestiĝa torina kinfestivalo, la kurtfilmo 7-minuta „La eta knabino aŭ kiel oni trovas ian helpon“.

■ La Ĝenerala Asembleo de UNESKO (97-11-12) decidis patroni la Universalan Forumon de la Kulturoj, okazonta en Barcelono en la jaro 2004.

■ 53a kongreso de SAT-amikaro realiĝos la 11,12,13 de aprilo 1998 en urbo Quintin apud St Brieuc, en departemento Cotes d'Armor en Francio.

■ Kiel antaŭ-kongresa evento, okazos de la 7-a ĝis la 10-a de aprilo 1998 la dua Bretona Esperanto Kanto-staĝo, kun kantoj nur en Esperanto, sed ĉu originalaj, ĉu tradukitaj aparte de la bretona lingvo. La staĝo finiĝos per koncerto antaŭ la kongreso.

■ Sojle de la Tago de Esperanto-Libro

UEA eldonis du interesajn librojn: Por festi la 50-jaran Esperanto-verkistecon de la aŭtoro, aperis PAJLEROJ KAJ STOPLOJ de William Auld. La 348-paĝa libro estas kolekto de eseoj, artikoloj, recenzoj, kaj prozaĵoj originalaj kaj tradukitaj. Ili aperis en Esperanto-gazetoj dum periodo de 50 jaroj kaj ne estis publikigitaj libroforme ĝis nun. La rehavebligado de tiuj daŭre valoraj tekstoj estas vera evento en la ĉi-jara librorkolto. La volumo estas aparte bele eldonita, kun plenkolora kovrilo. Prezo: 42 gld.

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO de prof. Andrew O. Urevbu, originale eldonita de Unesko, enkondukas en la ĉi-jaran temon de la Jardeko de Kultura Evoluigo. Ĝi traktas en fascina maniero la reciprokan influon de kulturo kaj teknika evoluo, kun apartaj analizoj pri la historiaj spertoj de Japanio, Ĉinio, Usono, Britio, Francio, Germanio, Sovetio kaj Afriko. La



64-paĝa libro estas tradukita de Johano Rapley. Prezo: 15 gld. Ambaŭ libroj estas haveblaj ĉe UEA kaj landaj libroservoj.

■ Kuba Esperanto-Asocio invitas vin partopreni sian jaran feston de la Esperanta Kulturo okazonta dum 1998 en la bela kaj gastama urbo Santiago de Cuba, situanta en la orienta regiono de la lando.

■ Stipendio Ivo Lapenna estos denove aljuĝita en 1998 por disertacio oficiale akceptita de universitata instanco en la jaro 1997. Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi

al la Stipendio bv. peti la detalan regularon de la sekretario-kasisto de Fondajo Ivo Lapenna, s-ro Jimmy Stryhn Meyer, p/a Lagoudaki, 59 Avenue de la Gare, LU - 1611 Luksemburgo, LUKSEMBURGIO. Limdato por la transsendo de faklaboraĵo en du ekzempleroj estas fino de februaro 1998 al: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, AT - 8020 Graz, AŬSTRIO.

■ La gazeto Esperantisto Slovaka, sendependa gazeto por esperantistoj (ne nur) en Slovakio, estas ekde nun trovebla (kaj abonebla) interrete en la adreso: <http://www.Esperanto.sk>; la indikita adreso baldau ŝanĝiĝos al dulingva ĝenerala informilo pri Esperanto (nacilingve) kaj pri la E-movado en Slovakio (Esperante).

■ Francaj fervojaj esperantistoj okazigos jarkunvenon de la 31-a de aprilo ĝis la 5-a de majo 1998 en la ĉemara urbeto „Plestin-les-Greves“ (norda Bretonio).

■ De la 20a de oktobro 1997 Pola Radio ĉiutage elsendas 4-minutan programon en E-o per la reto. Ĉi tiu nova iniciato (<http://www.wrn.org/audio.html>) ebligas la aŭskultadon de ĉi tiu E-informservo en la tuta mondo je kioma ajn horo tage aŭ nokte. De la reagoj de niaj retaŭskultantoj dependos, ĉu de la 1-a de januaro 1998 - komenciĝos aŭ ne komenciĝos plena duonhora radioelsendo de Pola Radio en E-o pere de la reto (pettyn@radio.com.pl).

■ Inter 16-18 de aprilo 1998 okazos en Szombathely (Hungario) la VIII-a Kongreso de Aplikata Lingvistiko. La kongreson organizos la nova universitata katedro de nia pedagogia altlernejo, ĝia ĉeftemo estas: La lingvo kiel intelekta kaj ekonomia kapitalo. Estante unu el la

ĉeforganizantoj, d-ino K. Smidéliusz sukcesis atingi dum la unua preparakunsido, ke ankaŭ interlingvistiko kaj esperantologio aperu inter la sekcioj.

■ Junaj volontulaj bonzoj, kiuj apartenas al Ŝin-Budhismo (sekte de Otani), agadas por pacmovado. Inter iliaj agadoj notinda estas tradukado de „Rezolucio kontraŭ Milito“, kiun la sekto deklaris en 1995 memkritikinte la historion de sia kunlaboro al la pasinta agresiva milito okazigita de la Japana Imperio. Ĝis nun oni jam lanĉis tradukojn en la angla, la ĉina, la korea kaj la tagaloga. Kaj lastatempe aldoniĝis ankaŭ Esperanta versio.

■ La venontjara itala nacia Esperanto-kongreso okazos de la 22a ĝis la 26a de aŭgusto 1998 en Frascati, ĉarma urbeto de la „Kasteloj“ (Castelli), la montetoj apud Romo (ĉirkaŭ 20 km sude), famaj interalie pro iliaj vinoj.

■ Pola Radio la 1-an de novembro 1997 elsendis rememorigan intervjuon kun Ada Fighiera-Sikorska, karmemora redaktorino de Heroldo de Esperanto, surbendigitan en 1990 de A. Pettyn.



UNESCO KAJ UEA

La aktiviĝo de la Unesko-agado de UEA portis pliajn fruktojn en la konferenco de neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) la 21-an de novembro en la sidejo de Unesko en Parizo. Ĝi estis la unua post la formala kompletigo de la NRO-reformo. Ĝenerala direktoro Federico Mayor alparolis la konferencon, emfazante la rolon de NRO-j kiel ponto inter Unesko kaj ordinaraj civitanoj. Li precipe alvokis NRO-jn al konkreta agado kadre de la Unesko-programo de pak kulturo.

La delegacio de UEA konsistis el vicprezidantino Renee Triolle, ĝenerala direktoro Osmo Buller kaj la konstanta Unesko-reprezentanto, d-rino Barbara Despiney. Ili tamen ne estis la sola esperantista delegacio. Nome, lastmomente antaŭ la konferenco venis la ĝojiga informo, ke male al sia antaŭa decido Unesko asignis la statuson de operaciaj rilatoj ankaŭ al ILEI. Sekve ILEI rajtis partopreni en la konferenco, kie ĝin reprezentis d-ro Francois Lo Jacomo.

Post la reformo 16 organizaĵoj (i.a. Internacia Asocio de Universitatoj, ĉe kiu UEA lobbias por la aliĝpeto de AIS) estas en asociaj rilatoj kun Unesko, dum 63 (i.a. Internacia PEN) havas konsultajn kaj 165 operaciajn rilatojn. Krome, 111 organizaĵoj ricevis operacian statuson por unujara provperiodo. Malpli ol duono el la NRO-j, kiuj antaŭe havis oficialajn ligojn kun Unesko, trairis sukcese la NRO-reformon. UEA kaj ILEI rajtas gratuli sin pri sia atingo, ne forgesante, ke ĝia konservo postulas

daŭran aktivadon. Ĉar krome TEJO rekte rilatas kun la Junulara Fako de Unesko, tiu aktivado plej efike realiĝos per kunordigita sektora agado: UEA ĉefe okupiĝos ĉe Unesko pri komunikado kaj kulturo, ILEI pri edukado kaj TEJO pri junularaj aferoj.

La reordigo de la kunlaboro inter Unesko kaj la NRO-komunumo multrilate ne estas preta kaj multe da malklareco restas. Por helpi klarigi la situacion ĝis la sekva NRO-konferenco fine de 1998 la ĉi-foja konferenco elektis reprezentajn organojn de la NRO-komunumo: Kontaktkomitaton el dudeko da NRO-j kaj Konsilion el kvardeko da NRO-j. Ilia taskaro estas ankoraŭ iom nebula, sed la unua kunveno de la Konsilio komence de decembro supozeble kreos ian klarecon. UEA fariĝis membro de la Konsilio, kio atestas pri prestiĝo, kiun UEA jam tradicie ĝuas en la NRO-komunumo, kaj metas ĝin en avanan pozicion en la nuna transira periodo.

El la agemo de UEA rezultis lastatempe ankaŭ aliaj, eĉ surprizaj respondecjoj. Unesko invitis d-rinon Despiney al malgranda komitato por prepari konferencon omaĝe al la 100-a datreveno de la malkovro de radiumo. Pasintjare ŝi jam membris en la organiza komitato de Unesko-kolokvo de entreprenoj kaj NRO-j. Sekve de tiu kolokvo kreiĝis Internacia Asocio por Partnereco inter Entreprenejoj kaj NRO-j. UEA estas ĝia membro kaj esperas povi plekti en ĝian agadon fakajn asociojn kiel IKEF kaj TAKE.

Osmo Buller



Scivole tra Esperantujo

☛ **34-jara blondharulino el Ukraino**
156/48 kun intereso

pri vojaĝo, muziko, sporto, ekologio kaj literaturo serĉas ne fumantan abstinentulon de 28 ĝis 46 jaroj por celo de geedziĝo: Ljudmila Gavriljuk, Str. Jevgena Konovaltsja d.1, kv. 70, 263007 LUTSK, Ukraino.

Slovaka televido, 2a programo, elsendis 5. 11. 1997 subvespere programon pri d-ro Vŝevlad Jozef Gajdoš, slovaka franciskana pastro, grava historiisto kaj lingvisto-slavisto. Inter liaj hobiaj menciita granda intereso pri Esperanto.

39a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno 07. 02. - 14. 02. 1998

Pohorje-Maribor-Slovenio, Hotelo Bellevue, ĉambro 50 DEM por tago/persono, skibileteto 20 DEM tage. Detalajn informojn petu ĉe: Fervojista E-Societo, pf. 825, SI-2001 Maribor, Slovenio

Novaj publikajoj

- Arthur Schnitzler: Songonovelo, trad. Michel Duc Goninaz, eld. KAVA-PECH 1997

- František Hýbl: Od Komenského k Zamenhofovi, Muzeum Komenského v Přerově, 1997

- Stanislav Schulhof: Sardinky, EK Pardubice

- Josef Rumler: Obnovené obrazy selského živobytí v Čechách

HEROLDO DE ESPERANTO

adresa: Pavel Polnický, Lesní 150/VI,

290 01 Poděbrady (tel. 0324/5651), roční předplatné 540,- Kč. Zaplatit můžete v každé pobočce Agrobanky na účet č. 429 531 - 584/0600 (nezapomeňte uvést své jméno na pokladní stvrzenku a její kopii P. Polnickému zaslat!!!) nebo poukázat pošt. poukázkou „C“ na výše uvedenou adresu. Na stejné adrese si můžete předplatit i časopis DIA REGNO, vydávaný KELI.

Esperanto Klubo „La Ponto“ Písek okazigis tradician Antaŭkristnaskan Renkontiĝon, kiu okazos la 13-an de decembro 1997 je la 9.30 h en Petrinum Soukenická 161, Písek. Amon kaj komprenon en nova jaro!

Internacia Pedagogia Revuo 4/97

alportas sur 36 paĝoj informojn pri kolokvo pri propedeŭtika valoro de E-o, pri ekzamenoj de UEA/ILEI kaj aliĝilon por ILEI-konferencon en Montpellier. Ne mankas ankaŭ financa raporto de ILEI, reagoj je artikoloj en la pasintaj numeroj, raportoj de landaj sekcioj, provo de japanaj gesamideanoj edukis infanon denaske en E-o kaj du novaj honoraj membrinoj de ILEI (Idyss Einihovici, Charlotte Kohrs).

La 13-a Ĉeĥa-Saksa Tago okazis kiel tradicie ĉiujare en Ústí nad Labem lige kun Zamenhofa festotago kaj antaŭkristnaska vigilio sabate la 13-an de decembro 1997 en palaco de J. E. Purkyně-Universitato, Hoření str.

Scienca edukado en Esperanto: IKU, AIS kaj AISIKU

La rolo de en Esperanto en la scienco kaj en universitata instruado iom paralelas al ĝia rolo en la pli ĝenerala lingva problemo tutmonda. La nuntempa scienca kaj akademia mondo pli kaj pli uzas la anglan kiel laborlingvon kaj por internaciaj kaj ofte ankaŭ naciaj aranĝoj. Tio tamen ofte malhelpas la progreson de la scienco, kiu bezonas la liberan interŝanĝon de scioj kaj spertoj sur la persona nivelo. Sciencistoj el ne-angle-parolantaj landoj ofte spertas la lingvajn barojn kiam ili provas raporti pri sia esploro en internaciaj forumoj. Kontraŭe, universitata instruado kutime okazas en la nacia lingvo, kaj ekzistas du lingva breĉo inter la instrua kaj labora-konferenca nivelo. Tiujn malavantaĝojn povas solvi Esperanto kiel internacia komunika lingvo.

IKU kaj AIS

Sur la tereno de scienca edukado en Esperanto elstarigas du institucioj kiuj regule okazigas kursojn kaj prelegojn universitat-nivelajn: la Internacia Kongresa Universitato kaj la Akademio Internacia de la Sciencoj.

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) kiel unu el la plej famaj kaj longdaŭraj institucioj en la Esperanto-komunumo, regule okazigas universitat-nivelajn prelegojn. Ĉiujare ĝi ofertas al centoj da aŭskultantoj kadre de la Universala Kongreso ĉirkaŭ dek prelegojn de spertuloj, akademiuloj en siaj fakoj, pri tre diversaj temoj, variantaj de astronomio ĝis ekonomio,

de komputiko ĝis literaturo.

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) estas fakte la sola Esperanto-Universitato. Ĝi funkcias kiel internacia migranta universitato, kiu okazigas sciencajn sesiojn en diversaj landoj, kaj disdonas akademian diplomojn kiuj estas oficiale rekonataj en pluraj landoj.

AISIKU

En la UK en Tampere (1995) la du institucioj unuafoje kombinis siajn programojn al komuna sesio, la tiel nomata AISIKU kursoj, kiam du okhoraj AIS kursoj aldoniĝis al la kutima programo de la IKU. La unua prelego de la du kursoj okazis kadre de IKU, kaj kongresanoj povis partopreni la ceteran kurson kaj eĉ ekzameniĝi kaj ricevi ateston de AIS - kion trideko da kongresanoj efektive faris. Tiu formulo, kiu kombinas la popularecon de la IKU prelegoj kun la alta nivelo de la AIS sesio montriĝis tre sukcesa kaj en Prago ripetiĝis tiu modelo. Tiufoje oni eĉ kombinis la inaŭgurojn de IKU kaj de la AIS sesio. La komunaj AISIKU aranĝoj ricevis formalan kadron per kontrakto inter UEA kaj AIS kiun la senato de AIS subskribis en ĝia septembra kunsido en Rimini.

IKU broŝuro de Adelaido

Ĉar en Adelaido ne okazis AIS sesio, IKU okazis en la antaŭa formo, sed tamen okazis novaĵo: la tekstoj de la IKU prelegoj estis haveblaj jam antaŭ

la prelegoj en belaspekta broŝuro. Ĝi estis akirebla al ĉiuj kongresanoj (ne nur al la partoprenantoj de la IKU) en la Libroservo. Per tiu ekperimenta eldono de la tekstoj UEA provas sekvi la kutimon de pluraj intenaciaj sciencaj konferencoj (kaj ankaŭ en ordinaraĵ universitataj kursoj) kie la tekstoj de la prelegoj estas haveblaj dum la konferenco, antaŭ la prelegoj. Tio ebligis al la aŭskultantoj preparigi kaj pli bone

sekvi la prelegojn, kaj al la kongresanoj kiuj ne povis viziti ĉiujn prelegojn tamen konatiĝi kun la enhavo. Dum la kongreso vendiĝis ĉirkaŭ centoj da IKU broŝuroj, sed kelkaj ankoraŭ restas kaj estas mendeblaj en la libroservo, kun la tekstoj de ĉiuj prelegoj (ankaŭ tiuj prelegoj kies tekstoj ne aperis en la broŝuro), por la simbola prezo de 5 gld.

Ankaŭ estonte UEA planas aperigi la tekstojn de la IKU prelegoj broŝurforme, kio garantios la aperon de la tekstoj kaj provizos regulan dokumentadon por la IKU.

AISIKU Montpellier

Cijare UEA klopodos prijuĝi la IKU prelego-proponojn pli frue ol en antaŭaj jaroj, kaj por povi pli bone elekti, kaj por havi pli da eblecoj por AISIKU kursoj. Proponojn por IKU prelegoj oni sendu kiel anonceto al la komisiito, prof. Michael Maizen, sed la proponantoj ankaŭ indiku ĉu ili povas prezenti pli ampleksan temon, en formato de 3-4 prelegoj, kadre de AISIKU. Proponoj alvenu laŭeble ĝis januaro 1998.

Amri Wandel

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1998

Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto au kun la temo de la UK: „Mediterraneo - ponto inter kulturoj“. Premio „Luigi Minnaja“ kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio „Ahn-Song-san“ kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. Eseo). Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1997. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1998. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1998.

Ĉion oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnneweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto.

Členská základna ČES - stav k 25. 11. 1997



Kategorie

počet členů

A - výdělečně čini	233
B - důchodci, studenti, nezaměst. ženy na MD	416
D - rodinní příslušníci členů v kat. A, B, F	69
E - příznivci esperanta	87
F - doživotní	413
F-C - čestní členové (žijící)	18
N - nevidomí	4

celkem je členů ČES 1.240
plus 4 občane pouze odebírají Starto bez členství v ČES

Z toho ženy: 595
 muži: 645

Nejstarší žena pí Ludmila Lukášová z Hradce Králové (nar. 3.4.1906)
Nejstarší muž a současně vůbec nejstarší člen ČES - p. Karel Zahradník
z Prahy (nar. 6.9.1903)

Nejmladší dívka - Dita Hršelová z Brna (nar. 10.1.1983)
Nejmladší chlapec a vůbec současně nejmladší člen ČES - Jiří Malár
ze Znojma (nar. 1.5.1988).

Z celkového počtu 1.240 členů je 882 organizováno v klubech a kroužcích,
individuálních členů je 358.

V roce 1997 do svazu **přibylo 42 nových členů.**

Od 1.1.1997 do dnešního dne naopak **ubýlo 163:**

35 zemřelo

9 položek bylo z kartotéky odstraněno - duplicita záznamů

9 se přestěhovalo bez udání nové adresy, Starto se vrátilo zpět

81 se odhlásilo z klubů

29 individuálních členů

vypracovala: Květa Hubnová

Odesílatel:

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
Internet: cea @ tnet. cz
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (28. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (28-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio
Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1

LORKOVÁ MARTA
CIHLÁŘSKÁ 16
602 00 BRNO